# Lukto favora al la internacia interkomprenigo

La tuta aktiveco de Henri Micard celis progresigon de la homo al feliĉo. Sur la politika kampo li pensis, ke ĉiu homo devas ricevi ĝustan parton el la profito donita de lia laboro. Sur la sindikata kampo, ke oni devigu la respondeculojn doni al la instruistoj ĉiujn eblojn taŭge praktiki sian tiom gravan profesion kaj al ĉiuj infanoj similajn okazojn utiligi siajn kapablojn. Sur la instrua kampo, ke oni devas prepari la infanojn, per metodoj plej taŭge adaptitaj al ĉiuj karakteroj, al sia rolo en la socio, al sia homa rolo, kiu baziĝas sur komprenemo, justeco, respekto al ĉiuj sinceraj kredoj.

Tiuj ideoj devenantaj de profunda amo al la homoj, kondukis lin al Esperanto, ĉar li tuj sentis, ke per internacia, neŭtrala lingvo, la homoj pli facile (ĉar rekte) interkomprenus unu la alian, ne blinde akceptante kion oni diras al ili pri la aliaj. Pro tio, ek de la jaro 1921, li sekvis parolan kurson gvidatan de Sro Echenbrenner en Sablé, 13 km. de Épineux. Li regule iris al Sablé kaj partoprenis en la vivo de la Esperantista Grupo de tiu urbo, sed nur en 1934 li mem gvidis kurson en tiu urbo. Samtempe li vigligis la Esperantistan rondon per vojaĝoj eksterlanden kaj akceptado de eksterlandaj grupoj.

La saman jaron en Lesconil (Bretonujo), instruisto, Sro Bourguignon organizis « Someran Lernejon » por la geinstruistoj dezirantaj lerni aŭ praktiki la internacian lingvon. Micard ĉeestis tiun Someran Lernejon. La loko elektita por la sekvantjara Somera Lernejo estis « Le Cap d'Ail » sur la Lazura Marboro. La sukceso de tiu studperiodo estis tiel granda, ke la ĉeestantoj opiniis ke Sro Bourguignon sola ne povas organizi la sekvantajn. Estis do decidite starigi specialan asocion : « la Grupo de Esperantistaj Edukistoj ». La prezidantino estis Jeanne Dedieu, kiu ankoraŭ, en 1966, okupas tiun postenon, kaj intertempe fariĝis prezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Ĝenerala sekretario fariĝis Micard. Unu el la taskoj de la ĝenerala sekretario estis la organizado de la Someraj Lernejoj. La unuan li organizis en La Tranche-sur-Mer, en la departemento Vendée. Granda estis la laboro, kiu komenciĝis jam dum Pasko : vizito de la urbestro, la lernejestro, la hotelestroj. Multaj instruistaj gesamideanoj venis en La Tranche-sur-Mer. La kursoj estis diligente sekvataj kaj la maro tre bonveniga. Okazis ankaŭ kunvenoj, okaze de kiuj oni multe diskutis, kelkafoje tre laŭte. La loĝantoj de la marborda urbeto ofte vidis la viglan aron kaj kompreneble la verdan stelon. El la multaj, diverstemaj diskutoj eliĝis la konvinko, ke ne sufiĉas nur unu Somera Lernejo, ĉar multaj estis la partoprenantoj kaj ne estis facile ĉiujn loĝigi, kaj ĉar kelkaj preferis la marbordon sed aliaj la montaron aŭ la kamparon. Pro tio ĝis 1939 okazis ĉiujare du Someraj Lernejoj ; en 1937 : denove La Tranche-sur-Mer, kaj Sallanches (en la Alpoj) ; en 1938, Erquy (sur la ĉanela Bretonia marbordo) kaj Poisssy (apud Parizo) ; en 1939 : Pornichet (Atlantika marbordo) kaj Gerardmer (Vosges). Kaj konsekvence la laboro de la organizanto duobliĝis. Tuj post la finiĝo de la somero, Micard devis



**Federacia Kongreso — SABLÉ — majo 1939**